



Mondcivitano

ORGANO DE CEARAA ESPERANTO-ASOCIO
4-A ELDONO 1-A JARO OKT-DEC 2005

Ĉefartikolo

Ĉu rapide?

Prof-ro Paŭlo Amorim Kardoza



Ĝi naskiĝis ĝuste je la unua momento de la jaro.
Neniu konis ĝin, neniu scias de kie ĝi venis, kiu estas ĝia patro kaj patrino. Ĉu ĝi havas gefratojn? Kiel oni nomos tiun aperanton? Ĉu tago?

Ĉu horo? Ĉu minuto?

Kiam ĝi grandiĝos, ĉu ĝi estos forta? Ĉu bona?

Dum ĝia travivado en ĉi tero, ĉu ĝi konkeros multajn geamikojn? Neniu povas diveni, neniu sukcesos aserti pri ĝi, ĉar oni timas erari.

Unu afero estas en la koro de ĉiuj kiuj atentis ĝin: la deziro ke ĝi kunportos pacon al la homaro por pli bona mondo!

Kaj vi, ĉu vi konas aŭ konis ĝin, ĉu ĝi donis ion al vi? Ĉu vi scias la nomon de tiu amiko kiu dum tricen sesdek ses tagoj kaj kvarono restis kun vi? Ĉe vi? Certe vi ĝin konis. Ĝi estis la jaro du mil kvin.

Ĝis du mil ses.

* * *

Tarcisio Lima festas la 140-a datrevenon de Iracema por opaco

Antaŭ la lasta semajno de 2004, mi finigis operon kiun mi jam komponadis ekde multa da tempo. Mi jam komponis ĝin sed mi ne finis la orkestrado kaj fine de decembro, danke al Dio, tio jam estis finita kaj ĉijare de 2005, UFC, la universitato kie mi laboras, eldonos ĝin. Mi publikigos ĝin kiel parto de la omaĝoj de la 140-a jaraĝa datreveno de Iracema, de José de Alencar. Mi jam petis al kolegaro, Piton, James Piton, el Campinas, ke li skribu la tradukon. Mi mem ne volis preni tiun taskon pro du kialoj: Mi estis tiam vere plenegaj kaj, aliflanke, mi volus ke iu alia faru la tradukon al esperanto, nek mi kiu estis tiel envolvita en la opera farado. Mi petis al kamarado James Piton kaj li jam finas. Tiam certe li jam finis kaj sendos ĝin por ke la partituro estu eldonata. Ni intencas, oni jam diris tion kaj UFC jam sin ekkaptis, oni pensis ke valoras la penon la publikadon portugallingve, evidente pro la origino, kaj duversie, unu angle kaj alia esperante. Esperante omaĝe al mi.

DAURIGAS PAGE 02



Por informoj aŭ kontribuadoj, kontaktu nin per:
mondcivitano-ce@yahoo.com.br
aŭ : (55 85) 9951-3955.



Cearaa Esperanto-Asocio
CNPJ: 11744851/0001-65
Caixa Postal 5001
CEP.: 60164-970 - Fortaleza -
Ce - BR
www.esperantoceara.org.br
cearao@gmail.com

Dr Afonso Silva de Lima

Clínica Geral - Pneumologia

CREMEC 2950
CPF: 073.314.013-00
CONSULTÓRIO:
Av. Bezerra de Menezes, 2711
Tel: 3287-2575/ 3091-7968



Aprenda Esperanto:
A língua internacional

2ª, 3ª, 4ª e 6ª tarde

Tarcisio Lima festas la 141-a datrevenon de la unua operejo



UFC ĉirilate tiel faras, oni informis al mi, ĉar mi estas esperantisto, ĉar mi proponis la aferon kaj ĉar mi estas la aŭtoro de la opero. Do estis bonege, inkluzive por ni. Ĝi taŭgas servon de dissciigo de la esperanta lingvo, ĉar Fortaleze oni provas uzi Esperanton serioze. Tiu libro estos evidente propagandita en diversaj universitatoj, tiel en Brazilo kiel en eksterlando kaj mi pensas ke estas bona marko por UFC tiu traduko en esperanto. Tiel postrestas la laboro.

La titolo de la nordorienta opero estas "Moacir das sete mortes", "Moacir das sete mortes ou a vida de um desinfeliz caba da peste". Vere la operteksta aŭtoro, kiu estas Gustavo Barroso, uzas certajn tre specialajn esprimojn kaj la esprimoj kiuj ne estas tre specialaj estas tre poetikaj. La historio de "Moacir das sete mortes" rakontas la historio de la cearaa homo, enhavas frazojn de ĉiuj epokoj de la historio de Brazilo, ekde la koloniigo ĝis hodiaŭ... La kamaradoj ludas "coco"-n*, kantas kaj faras "repentes"*... Kaj aparas la placon José de Alencar en Fortaleza urbcentro.

Estas poetika momento kiam Pero Coelho (Pero Koeljo) alvenante antaŭ sia armeo, diras: "terra à vista cobro o teu tributo em aguardante, fumo, pedras preciosas". La maristoj kriis "terra a vista", oni jam vidas la teron, la teron estas videbla. La esprimo kiun la opertekstisto uzis estus alia en Esperanto, iuj vortoj, iuj esprimoj estus uzataj. La aŭtoro uzis "terra a vista" pagpostulas mi cian tributon... te, alia situacio estas, "terra a vista" estas pagpostulata ĉe prezento. Pro tio kaj ial li telefonas al mi: "kara, kiel mi tradukos tion?". Do mi diris: "Pro tio mi fidis vin!" Pro tio kaj ial mi ne prenis sur mi "la ananaso"*. Bone, mi kredas ke ĉijaro de 2005 tio estos realigata.

* Tiu teksto estas parto de parolado de Tarcisio Lima al CEA portugallingve. Interpretis al e-o Damiana Britto

Coco_ tipika danco.

Repente_ regionala ludo kun gitaro. La kantistoj voĉludas kantante historion kiu devas esti daŭrigata por la alia.

Ananaso. Esprimo kiu signifas *malfacila tasko*.

Pri la paĝaro de CEA

La paĝaro estas disvolvanta uzante la retrogramlingvon PHP. Helpe de tiu programlingvo oni povas manipuli arkiivojn, datumbazojn kaj procezi informojn antaŭ sendi ilin al la uzanto. Sen ĝi ne eblus disvolvi retbutikon bonkvalitan, ĉar estus tre malfacile meti informojn pri novaj produktoj. Cetere la komunikado inter la aĉetonto kaj la vendisto ankau estus pli malfacila. Ekde la tria semajno de Julio mi iniciatis la laborojn por disvolvi nian retbutikon.

Rilate al la normala enhavo de nia paĝaro (informoj pri nia asocio kaj pri Esperanto), ni ankoraŭ devas evolui. Jam estas preta la sistemo, kiu aŭtomate ricevos viajn kontribuojn (tekstojn, bildojn, ktp). Nun oni bezonas nur, ke iuj, kiuj bone scipovas redakti kaj havas bonan volon (pli gravas bonvolo ol redakt-kapablo), okupiĝu skribi kelkajn aferetojn por sendi ilin al la paĝo. Kiel estas atendeble, ni estas asocio kaj ĉiuj devas kontribui por nia kreskado en ĉiuj flankoj, inkluzive en ĉi tiu laboro, kiu nur ŝajnas malfacila, sed vere estas facilega.

Nuntempe la adreso de nia retpaĝaro estas: www.esperantoceara.org.br

Wesley Alcoforado

AGENDO 2005

Novembro

18-an - 20-an – Vojaĝo al Jericoacoara


Decembro

10-an – IV-a Zamenfesto
15-an - Datreveno de Zamenhof

astaj

★ VIZITANTOJ

Ni dankas la vizitojn de la paro Julio kaj Ania Calegari (SP-BR), Magali kaj Florant (FR) kaj Gerry kaj Lana (US) kiujn multe plaĉis al la Fortalezanoj.



Malarmado

Ĉu jes aŭ ne?

Eduardo Tavares de Araújo, advokato.

Deksepan de Januaro, du mil ses. Johann, posedanto de kvartale dezirebla barako, iras al la foiro. Tie estas ĉio: papago, eluzita pneŭo, poŝtelefono kaj eĉ ĵabutikabo. Sed Johano volas havigi al si armilon. Li diras, ke li havas malamikojn. Li rigardas tie kaj tie, flustras kaj tuj elpezas okdekon el la cent realoj, kiujn li havis. La revolvero jam multe uzita je la tempo havas kalibron tridekok kaj bone pafas laŭ la vendisto.

Lu ajn estu la rezulto de la Referendumo de la venonta dudektria de oktobro, Johano sukcesos aĉeti al si la armilon kiun laŭŝajne li bezonas. Kaj atentu, ke Johano, kies menso estis influita de "Globo"-aj artistoj voĉdonis "jes". Krom tio, sendepende de la konkludo de la balotado, kiu alvenas, Johano, se malkovrita kun la armilo suferos la rigorojn de la leĝo 10.826/05 konata kiel Statuto de la Malarmado. Ni analizu ĝin, eĉ en malmultaj linioj.

Posedi armilon leĝe ne estas facile. La postuloj de la Statuto ne estas malmultaj: ekzamenoj, testoj, atestoj, taksoj neniel moderaj por la nomata ordinara civitano kaj eĉ minimuma aĝo de dudek kvin jaroj. Venkante "ne", ĉiu ĉi kruta vojo daŭros. Voĉdonante la plejparto "jes", la procezo por aĉetado de armiloj kaj municio estos la sama, sed malplimultaj individuoj povos al ĝi submetiĝi, t.e nur tiuj, al kiuj koncernas certaj oficoj. Estas la 6-a artikolo de la leĝo. Memoru ni, tie ĉi, ke ni parolis pri la leĝakomercado kaj ke, voĉdonante "jes" aŭ "ne", la armportado jam estas malpermesita, krom por tiuj kies oficoj estas priskribitaj en la cita 6-a alineo.

Kaj la nigra merkato? Nu, tia ja kontraŭleĝas kaj, ankoraŭ foje, voĉdonante "jes" aŭ "ne", Kelkaj prave diras, ke la plejmulto de la kaŝe aĉetitaj armiloj estis foje laŭleĝigitaj, kiel la de Johano.

Sekve, prohibicio de komerco de komerco de armiloj kaj municio malgrandigas la kvanton de armiloj kontraŭleĝe venditaj, malgrandigante, *pari passu*, la hommortigadon. La reduktado de la nombro de viktimoj de murdoj per fojrrarmaĵoj post pormalarmadkampanjoj atestas evidentajn — ju malpli mortigiloj, des malpli deliktoj. Tamen krimo estas ŝanĝema kaj tuj eltrovus rimedoj provizi la maŝinton de laŭleĝaj armiloj. Ekzemple, karioka polico havigis al si potence blenditajn vitimilojn por alfunti drognegoco en la supra de montoj em Rio-de-Janeiro. En mallonga tempo la "gangsteroj" importis el Irako eksplodigilojn kontraŭ armeaj tankoj.

Jes, Brazilo estas surreala.

P.S.: Monatoj post akiri protektilon, Johano estis surprizita de polica kontrolo kaj arestita kun la mano em la sako pro ne leĝa armportado. Kondamnita al monpuno kaj al du jaroj en prizono laŭ alineo 14-a de la Statuto, li pasigis ĉirkaŭ ses monatojn en arestejo antaŭ ol gajni kondiĉan liberecon, tempodaŭro sufiĉa por konatiĝi al iuj "amikoj". Eĉ se estis la alia la rezulto de la Referendumo, la samo estus okazita.

JES

La brazila konstitucio (1988) inaŭguris novan eraon en demokratio nialande terminoj. Ĝi malfermas spacon al tio, kiun oni nomas semidirekta demokratio. Krome la universala aprobo delonge konsakrita al novaj institutoj tiel, kiel la referendumo kaj la popola iniciato por leĝofarado.

Referendumo laŭ modas en Brazilo: ni unuos unufoje kaj ankaŭ unufojas la temo en la mondo.



astaj

★ FRUTAL



Esperantistoj vizitis la foiron kiu kunigis multajn agrikolajn profesiulojn el diversaj ŝtatoj de Brazilo. La okazaĵo estis em Centro de Convenções kaj Mauricio tie estis reprezentante EMATERCE.



Estu Forta!

- ◆ Estu forta!
- ◆ Kvankam ploriĝis viaj ridoj
- ◆ Kvankam viaj idealoj,
- ◆ Malgraŭ multaj bataloj,
- ◆ Ankaŭ ne estis atingitaj
- ◆ Estu forta!
- ◆ Kvankam via vivo estas plena da deprimado
- ◆ Kaj via kunul(in)o estas nur la izoleco!
- ◆ Estu forta!
- ◆ Kvankam ĉiuj rifuzas vin
- ◆ Kvankam ĉiuj kritikis vin
- ◆ Kvankam ĉiuj malamas vin

Kaj vi estas neniulo.

Estu forta!

Kvankam vi vivas

En plena mizero,

Kaj la hejmo,

pri kiu vi revis

Estas domaĉo

tre malriĉa

Kaj sur la tablo

vi ne havas

panon

Por via filo manĝi!

Estu forta!

Ĉar se vi persistos,

Vi venkos la obstaklojn:

Per via amo kaj via fido!

Poezio
Poezio

Jorge Furtado



Temas pri rekta konsulto al popolo, kiu devas jesi aŭ nei certigante aŭ forĵetante leĝon. La 23-an de oktobro 2005, la brazilanoj iros al la voĉdoniloj por decidi ĉu oni volas aŭ ne la prohibicio de komerco de armiloj kaj municio Brazile.

Nu, oni devas klarigi kelkajn punktojn: kio estas debatata estas la prohibicio de komerco de armiloj kaj municio en Brazilo; ne la malarmado. Oni rimarku ankoraŭ ke punkton ege grava ekestas forgesita de la oficialaj kampanjoj: la armportado estas kontraŭleĝa kaj tiel estas krome la Referenduma rezulto.

ARGUMENTOJ POR LA JESO

- 1- Estas multaj armiloj en tiu ĉi lando.
- 2- Armiloj estis faritaj por mortigi.
- 3- Havi armilojn hejme pligrandigas la riskon, ne la protektecon.
- 4- La ĉeesto de armilo povas ŝanĝi iun ajn civitanon al krimulo.
- 5- Kiam ekzistas armilo hejme, la edzino plej riskiĝas esti pafita ol la ŝtelisto.
- 6- Okaze de armila ŝtelo kiu pafarmile reagis plej riskiĝas mortigi.
- 7- Kontrolu la leĝajn armilojn helpas en la milito kontraŭ la krimo.
 - A - La kontraŭleĝa merkato provizas la neleĝa.
 - B - La armiloj aĉetitaj leĝe riskiĝas pere aliri la eraĵojn manojn pere la ŝtelo, revendo aŭ perdo.
- 8- La Statuto de la Malarmado estas leĝo kiun la banditoj malarmigas.
- 9 - Kontrolu la armilojn savas vivojn.
- 10 - Malarmado estas la unua paŝo.

George Felício, advokato

Respondŝilosilon de la KRUC-VORTENIGMO de la 3-a eldono



D	O	M	I	N	G	U	E	S	H	R	Y
									A	O	Z
	K	N	O	E	D	T			R	C	A
Z	A	M	E	N	H	O	F	A	H	L	A
	L	H	O	D	L	E	R	B	R	A	G
	O	A	L	M	A	D	A	A			
C											
				P	N	G					
	S			E	C	I					
	A			N	I	U					
	Y			N	N						
P	R	I	V	A	T	I	L	O	R	E	N
										Z	

RESPONDECARO:
 Eldono: Damiana Britto
 Ĉefartikolo: Prof-ro Paŭlo Amorim Karadozo
 Diagramado : Ligia Taillade kaj Damiana Britto
 Enretigo: Wesley Alcoforado
 Revizio: Wandemberg Moraes

Ni dankas al:
 Ĉiuj, kiuj laboris kune kun ni en tiu eldono.

JULIO KAJ ANNA CALEGARI

Sab, 12-an Nov, 2005 21:55:43

Denove mi devas danki al esperanto!

Mi eklernis esperanton en 1995 ĉar mia frato jam ĝin scipovis kaj tiam ni povus ĝin uzi kiel nia sekreta lingvo ĉar neniu nin komprenus! Post la unuaj klasoj mi tuj rimarkis ke esperanto povus esti multe pli utila kaj grava afero ol dufrata sekreta kodo!

Mi studis administradon de turismo kaj kiam mi komencis labori en la flugkompanio Varig en la internacia flughaveno de São Paulo kaj ekhavis la eblecon malmulte koste aĉeti flugbiletojn, tiam esperanto kaj certe Pasporta Servo iĝs ege grava ilo por mi.

Je Aprilo de 2001 mi vojaĝis al Italio por partopreni IJF (Internacia Junulara Festivalo). Estis mia unua internacia renkontiĝo kaj mi multe amuziĝis! Tiam mi konatiĝis Anna Maria, tre bela kaj simpatia polino kiu post la aranĝo invitis min dum mia vojaĝo al Pollando ŝin viziti em la urbo Bydgoszcz. Tien mi iris kaj konatiĝis ŝian familion kaj ankaŭ ni ekkoramikiĝis!

Post 3 jarojn kaj pluraj vojaĝoj miaj al Polando kaj ŝiaj al Brazilo ni je julio de 2004 geedziĝis! Kaj daŭre kaj ree pere de esperanto kaj PS faris nian vojaĝon de luna de mielo al Amazonio, Koreio kaj Ĉinio!

Je 2005 ankaraŭ multe el la vojaĝojn faritaj de ni okazis helpi de esperanto. Mi restis dum 3 semajnojn en Freiburg, sudo de Germanio por lerni germanan lingvon kaj tiam mi ankaŭ gastigis ĉe esperantistoj!

Je la fino de oktobro ni iris al Fortaleza kaj ankaŭ tiam ni gastigis ĉe esperantistoj kaj faris tre bonajn geamikojn ! Kelkajn el ili jam estis eĉ amikoj de tiuj kiuj mi renkontis en Freiburg! Ege impresis nin la semajna kunveno de la loka grupo, kie oni ankaŭ kaptas la okazon por la praktikado de la koruso kaj por instrui la germanan kaj latinan.

Laŭ mi hotelo estas ĉiam la sama afero ĉie en la mondo. Sed kiam vi gastigas ĉe loka loĝanto vi povas pli bone koni la vivon, kutimon kaj kulturon de la regiono. Ankaŭ la konsiloj pri kien iri kaj kion fari estas ĉiam pli bonaj kiam donataj de lokaj geamikoj. Mi esperas ke baldaŭ ni povos denove vojaĝi kaj renkonti tiuj geamikoj kaj egale ili estas bonvenaj ĉe ni!

COLÉGIO DOMINIUM
Qualidade em primeiro lugar

Do maternal à 7ª série do Ensino Fundamental
 Av. Tenente Lisboa, 2295 - Jacarecanga
 Fortaleza -Ce CEP: 60330-000
 (85) 3236-6397